

Eŭropa Bulteno

Marto 2007, № 3 (57)

De la redakcio...

HONORIGO DE SINJORO ETSUO MIJOSHI FAR EEU



S-ro Etsuo Mijoshi

La estraro de EEU decidis dum sia lasta skajp-kunsido, ke s-ro Etsuo Mijoshi estos nomumita „Honora membro de EEU“. Li estos la unua, tiel ĉi honorigita homo entute – konforme al la decido pri la apartaj (neasociaj) membrecoj – kiuj estas konsiderataj kiel premiigoj por longjara agado kaj/aŭ financa helpo al EEU (detalojn bv. legi en la Eŭropa Bulteno, n-ro 56: http://europo.eu/bulteno/1_56.pdf).

La transdono de diplomo kaj medalo al s-ro Mijoŝi okazos dum la UK en Jokohamo, far estraranino de EEU Flory Witdoeck.

La titolo estis aljuĝita al s-ro Mijoŝi ĉefe pro lia konstanta, longjara subtenado de la E-movado, pro plurjara signifa financa helpo al EEU kaj lia konstanta agado poresperanta – kaj Eŭrop- kaj mond-skale.

Japana mecenato helpis al multaj gravaj agoj, aranĝoj, projektoj, kiuj povis realiĝi ĉefe nur danke al lia malavara financa helpo kaj kunlaboremo. Inter ili ni menciuj almenaŭ kelkajn - tutpaĝaj anoncoj en eŭropaj tagjurnaloj; financado de la DVDj „Esperanto elektronike“ - donacitaj al ĉiuj EU-parlamentanoj; okazigo, partopreno kaj financado de pluraj lingvopolitikaj debatoj; vespermanĝoj – kun eŭropaj diplomatoj, politikistoj, lingvistoj; kunfinancado de E-aranĝoj (ekz. IJK en Zakopane...); prelegado dum pluraj Esperanto-aranĝoj, ktp.

Honorajn membrojn de EEU la estraro nomumados neregule, kvankam ideo estas transdonadi la titolon ĉiujare, dum Universala Kongreso aŭ EEU-kongreso.

Ni tiel ĉi same alvokas legantojn sendi al ni proponojn por ev. taŭgajn kandidatojn por la „Honora membro de EEU“.

Seán Ó Riain
prezidanto de EEU

EUROPO BEZONAS KONSTITUCION

Karaj legantoj. Ĉi sube ni aperigas la alvokon de nia honora membro s-ro Umberto Broccatelli, iama prezidanto de EEU, kiu samtempe estas aktivulo de eŭropaj federalistoj. La alvoko ne rekte rilatas al Esperanto, sed mi opinias ke ĝi meritas la publikigon. Tiuj esperantistoj, kiuj konsentas, subtenos la iniciaton de la federalistoj, aliaj kompreneble ne. Ni kiel esperantistoj de Eŭropo certe estas interesitaj pri la baza eŭropa leĝdokumento.

(Zlatko Tisljar, sekretario de EEU)

Decidu la eŭropa popolo

Antaŭ la defioj de la tutmondiĝo, de la internacia terorismo, de la milito kaj de minacanta vivmedia krizo, por Eŭropo venis la momento fari plian antaŭenpaŝon. Tio signifas ke la projekto pri Konstitucio devas esti relanĉata.

Eŭropo bezonas Konstitucion por:

- efike agi por krei pli multajn kaj pli bonajn laborpostenojn en perspektivo de eltenebla disvolviĝo;
- kontraŭbatali la trovarmiĝon de la klimato kaj garantii elteneblan ofertadon de energio;
- defendi kaj plifortigi la fundamentajn rajtojn;
- ĉesigi la demokrati-deficiton de la eŭropa Unio;
- efike paroli en la internacia areno por antaŭenigi la valorojn de la paco kaj de demokratio kaj ĉesigi konfliktojn kaj militojn.

Efika eŭropa Unio devas esti demokratia kaj bazita sur la popola konsento. Tial la eŭropa Konstitucio devas submetiĝi al konsulta referendumo de la civitanoj de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj en la sama tago de la eŭropaj balotoj de 2009 kaj iĝi aprobita per duobla plimulto, de civitanoj kaj de ŝtatoj de la Unio.

La ideo de Eŭropo estas tro grava por ke ĝi estu lasata al la solaj politikistoj.

Decidu la eŭropa popolo.

Unio de la Eŭropaj Federistoj (UEF) Eŭropa Federalista Junularo (JEF)

PETICIO

Al la eŭropa Parlamento, al la Ŝtatestroj kaj Registarestroj kaj al la exuropa Komisiono
Mi postulas eŭropan konsultan referendumon pri la eŭropa Konstitucio, okazigendan en la sama tago de la balotoj por elekto de la eŭropa Parlamento en 2009.

Vi povas subskribi tra Interreto: www.europeanreferendum.eu

Unu miliono da subskriboj por eŭropa referendumo

NOVAĴOJ PRI FREMDAJ LINGVOJ EN BRITIO



Prieduka sekcio de la brita gazeto "Guardian" anoncas hodiaŭ la novan decidon pri fremdlingvoj en Britio: <http://education.guardian.co.uk/schools/story/0,,2032152,00.html>

Laŭ tiu decido unu fremdlingvo estos nun devige lernenda de ĉiu 7-14-jarulo ekde 2010, malgraŭ avertoj de instruistoj, ke tio apenaŭ eblos, aparte en malgrandaj lernejoj, kie malgranda nombro da instruistoj instruas ĉion en jam superplena kursaro, [kaj tri jaroj apenaŭ sufiĉas por trejni novajn fremdlingvajn instruantojn - kaj de kiu lingvo?!].


Tiu ŝlosila decido ŝajne sekvas el antaŭnelonga raporto de Lordo Dearing, taskita pri esploro de la tuta lerneja fremdlingva politiko. Oni agnoskas, ke tutmondigo postulas, ke britaj lernejoj havu eblecon lerni fremdlingvojn kaj restu en kontakto kun ili ĝis la fino de la devigaj lernejaj jaroj. [Tio tamen pasintec ne grandnombre okazis, do kial estontece?!]

En 2002 tamen la registaro forprenis de 16-jaruloj la devigon al fremdlingvoj, pro kiu decido komercestroj kaj Konservativuloj nun ekkaptas la oportunun kritiki la registaron deklarante, ke oni estus devintaj unue prepari la fremdlingvan grundon ĉe la primaraj lernejoj antaŭ ol forigi la devigon ĉe la sekundaraj lernejoj. [La tuta fremdlingva afero ŝajnas indiki kunflikitaj kaj malbone elpensitaj planoj, kaj malmulta sperta scio pri fremdlingvoj - krome oni ŝajne simple ignoras konsilojn pri kurso pri ĝenerala prilingva konsciigo kaj propedeŭtika fremdlingvo flanke de Esperantistoj]

Kroma afero - Hay Group [internaciaj konsultspecialistoj pri administrado] anoncis hodiaŭ, ke la neeblo de britaj diplomstudentoj paroli la mandarenan minacas la kapablon de la brita komerco atingi la en 2009 atendatajn vendojn de £200 bil. [miliardoj?] al Ĉinio. Oni devas, k maleme devos, anstataŭe rekruti kaj dungu ĉinojn kun diplomo MBA (magistro pri komerca administrado). Nuntempe en Britio nur malpli ol 500 studentoj diplomiĝas ĉiujare posedantaj signifan scion pri la mandarena. Hay Group plie alvokas ĉiujn eŭropajn MBA-kursojn inkluzivi eron pri Ĉinio por tiel provi malebligi la plian rekrutadon de ĉinaj MBA-diplomitoj fare de la brita komerco. [!!!]

Brian D.Kaneen

NOVA MANLIBRO PRI VIKIPEDIO EN ESPERANTO



Fine de marto estis anoncita eldono de la libreto „Vikipedio – praktika manlibro“ far [E@I](#) kaj TEJO.

Temas pri la dua (signife plibonigita) eldono de la broŝuro, kies celoj estas ĉefe:

1. Per manlibro klarigi kial kaj instrui kiel verki en Vikipedio. Ne temas nur pri la esperanta Vikipedio; oni ankaŭ volas instigi verki pri la Esperanto-kulturo en la nacilingvaj Vikipedioj; ekzemple per la kreado de portalo pri Esperanto en diversaj lingvoj.
2. Trejni aktivulojn. Per la manlibro oni ankaŭ plifaciligas laboron de la landaj asocioj. Per praktika manlibro eblas facile organizi praktikadosesiojn pri Vikipedio.

La ĉefredaktoro de la manlibro estis Yves Nevelsteen. La libreto sur 40 plenkoloraj paĝoj klarigas skize historion de la Vikipedio, rakontas pri aliaj „viki-subprojektoj“ kaj detale informas kiel

verki kaj redakti la interretan liberan enciklopedion.

La duan eldonon por [E@I](#) kaj TEJO eldonis ESPERO (www.espero.sk), en 1000 ekzempleroj.

La broŝuro estis kunfinancita de UEA, TEJO, [E@I](#), La Progreso (loka Esperanto-grupo de Gent), GEJ (Andreas Diemel) kaj Tamas.

Detalojn pri la manlibro troviĝas ĉe: <http://vikio.ikso.net/ManlibropriVikipedio>

Detaloj pri Vikipedio-projekto legeblas ĉe: <http://vikio.ikso.net/Vikipedio>

Antaŭmendojn bv. sendadi rete al: Peter Baláž (Petro) - petro@ikso.net

aŭ: Yves Nevelsteen - yves.nevelsteen@gmail.com

Peter Baláž kaj Yves Nevelsteen

MEZEŬROPAJ KONSULTIĜOJ - ĈI-JARE EN MARTIN

Fine de aprilo (27.-29.04.2007) okazos en Martin, Slovakio aranĝo “Mezeŭropaj konsultiĝoj” - aranĝo kun plurjara historio, celanta kunligi la reprezentantojn de mezeŭropaj landoj – kiuj dum tiu semajnfino kunsidos kaj informiĝos reciproke pri la E-agado en siaj landoj, planos komunajn aktivaĵojn, kalendaron de aranĝoj.

Ĉi-jare la aranĝo ricevos ankaŭ novan dimension – por iom reciproke pliproksimigi la generaciojn de E-aktivuloj, slovakaj organizantoj decidis inviti po unu reprezentanto de la plenkreska kaj po unu de la junulara movado en unuopaj landoj.

Al la venintoj estos prezentita ankaŭ la ĵus preparata “Alvoko de Martin” - kiu estas planata kiel komuna ebla kontribuo al la plua disvastigado kaj rekono de Esperanto en Eŭropo.

Peter Baláž

LA 8-A KONFERENCO DE LATVIA ESPERANTO-ASOCIO

La 24an de februaro 2007 en la domo de Latva Societo de Rigo okazis la 8a Konferenco de Latvia Esperanto-Asocio (LatEA). En la unua parto de la konferenco estis prezentitaj du prelegoj: Margarita Zelve prelegis pri Semajno de Internacia Amikeco kaj Tago de Gepatra lingvo en la mondo kaj Biruta Rozenfelde pri Esperanto en Latvio antaŭ 50 jaroj. Siajn rememoroj pri Esperanto-movado en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento rakontis ankaŭ Aristids Medins kaj Aris Smildzins. Post kafopaŭzo kadre de konferenco okazis Ĝenerala kunveno de membroj de Latvia Esperanto-Asocio. Ĝin gvidis Margarita Zelve. Pri sia laboro dum lastaj 3 jaroj raportis prezidanto de LatEA kaj la estraro. Revizoro de la asocio raportis pri la financa situacio de LatEA.

Pri specialaj meritoj en evoluo de Esperanto-movado en Latvio Biruta Rozenfelde ricevis la ateston pri la atribuo de la titolo "Honora membro de Latvia Esperanto-Asocio".

Sekvis la elekto de la estraro kaj revizoro.

Nova estraro de Latvia Esperanto-Asocio:

Prezidantino - Margarita Zelve

Vicprezidantino - Biruta Rozenfelde

Kasistino: Aina Janusevska

Estraranoj: Mara Timermane, Aldis Bushs, Janis Kalnins, Aristids Medins

La revizoro por la sekva jaro estos Alida Zigmunde.

La kunveno elektis Biruta Rozenfelde la komitatanon A de UEA por la sekva periodo.

Margarita Zelve

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO EN AGAY, SAINT RAPHAEL, FRANCIO

Fine de februaro en belega hotelo, marapude, renkontiĝis tri dekoj da esperantistoj . Okazis vera internacia esperanto lernejo, kun diverslandaj instruistoj kaj gelernantoj.

La instruado miksis kun ekskurzoj, amika babilado, ludoj kaj multaj promenoj rapide pasis. Sed la Mediterana Esperanta Semajno okazos denove venontjare. Ĝis tiam!

Monique Prezioso



LA TRIA MONDA FESTIVALO DE LA TERO, OKAZONTA INTER LA 18-A KAJ LA 24-A DE JUNIO 2007



Samtempe en 24 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj okazos inter la 18-a kaj la 24-a de junio 2007 La tria Monda Festivalo de la Tero. En la himno de la Festivalo oni uzas esperanton. La himnon kantas infana koruso "Les Petits Chanteurs De Meaux", kaj vi povas aŭdi kaj spekti ĝin ĉe la retpaĝo: <http://www.youtube.com/watch?v=-SnVQnIS2rs&NR>

*Am', glor', pac' kaj ĝoj'
En niaj anim' kaj kor'
La birdoj de l' feliĉ'
Alportos la esper'
De mond' pli bona
Sur la Ter'*

*Pluvo de steloj en la ĉiel'
Eterna rigardo
La kant' de l'harmoni'
Rideto al la viv'
La man' de infan'
Pura kaj senkulpa
Verec'
Unuec'
Liberec'*

*Am', glor', pac' kaj ĝoj'
En niaj anim' kaj kor'
La birdoj de l'feliĉ'*

*Alportos la esper'
De mond' pli bona
Sur la Ter'*

*De la reĝlando de lum'
Rebril' de l'Univers'
La kolombo de la pac'
Ekflugos al la ĉielo
Kie am' estas leĝ'
'stas por morgaŭ
La branĉet'
D'olivuj'
Liberec'*

*Paradizo sur la ter'
La glor' por l' Univers'*

*Ammesaĝo por niaj infan'
Esperemo*

Pliaj informoj pri la festivalo vi povas trovi ĉe <http://www.festivaldelaterre.org>
Dezirinde estus ke ankaŭ esperantaj lokaj organizaĵoj partoprenu tiun aranĝon.

Vesna Obradović

*Pri nia kongreso...***ALPA ANTAŬKONGRESO EN JEZERSKO (SI)**

Ĝi okazos en proksima Jezersko, pitoreska alpa vilaĝo, inter Kranj kaj Klagenfurto, ĉe sloveno-aŭstra landlimo. Jezersko, kun surmara alto 906 m, estas ĉirkaŭata per alpaj montaroj altaj ĝis 2540 m. Tuj apude situas unu el la plej altaj slovenaj akvofaloj Ĉedca (130 m). La akvofalo estas videbla el la hotela teraso.

La klimato estas modera alpa, kaj ĝi bone influas kontraŭ diversaj malsanoj de spirvojoj, pulmoj kaj okuloj.

Konforme al la kongresa ĉeftemo »Akvo« dum la antaŭkongreso vi konatiĝos surloke kun kelkaj specifaj akvaj fenomenoj. Ni vizitos la

famajn slovenajn alpajn lagojn Bled kaj Bohinj, fonton de la rivero Sava (Savica), Bledan kanjonon, akvofalon Ĉedca kaj la Paŝtistan lagon. Aparte estos interesa vizito al la fama Kavoj de Postojna kun la kava fervojo kaj rara aŭtoktona speco proteo (»la homa fiŝeto«). La saman tagon ni vizitos la ĉefurbon Ljubljana kie situas Kastelo de Ljubljana de kie etendiĝas bela panoramo.

Pliaj informoj vi povas legi ĉe:

http://www.esperanto-maribor.si/programo_de_antaŭkongreso_en_jezersko.html

<http://www.burger.si>

**EŬROPA INFANA KONGRESETO - PARALELA PROGRAMO DE LA 7-a KONGRESO DE EEU**

Ĝi okazos en la proksima infana ripozejo Areh sur montaro Pohorje. Areh situas 25 km de Maribor, surmara alto de 1246 m.

Ĝis nun aliĝis 8 infanoj el 4 landoj.

La programon gvidos Judita Rey Hudeček el Zagreb.

Bonvolu legi pri ĝi ĉe http://www.esperanto-maribor.si/programo_de_kongreseto.html

ĜIS NUN AL LA KONGRESO ALIĜIS 177 GEESPERANTISTOJ EL 25 LANDOJ: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugalio, Ukarainio, Hungario, Svedio, Danio, Belgio, Ĉeĥio, Aŭstrio, Serbio, Britio, Nederlando, Slovakio, Litovio, Svislando, Kanado, Kongo, Rumanio, Bosnio, Kroatio kaj Slovenio. Ni atendas ankaŭ vian aliĝilon.

Rigardu nian tt-ejon www.esperanto-maribor.si. Eblas aliĝi rete.

SOMERA INTERNACIA E-LERNEJO – ĴUS ANTAŬ EEU-KONGRESO

La Internacia somera lernejo de Esperanto okazos inter la 21a – 27a de julio en Slovakio - ĵus antaŭ la EEU-kongreso. Okaze de la centĵariĝo de E-o en Slovakio la nova aranĝo – somera lernejo, migranta de ŝtato al ŝtato sub la nomo: „**Slava Esperanto Studado**“ (SES) gastigos ĉi-jare en hotelo Esperanto, en civito Pribylina – en liptova regiono (40-minuta distanco aŭte de Altaj Tatroj).

Sian partoprenon jam konfirmis studentoj el 7 nacioj – tiel oni povos atingi pli rapidan lernadon – motivigitan je emo komuniki tuj kun eksterlandanoj.

La programo estos dividita al 2 partoj:

- kurso por komencantoj (gvidos slovako Stano Marček – ĉefredaktoro de la Revuo Esperanto)
- kurso por progresintoj (gvidos rusino Mirina Gončarova, alterne kun pluaj eksterlandaj instruistoj)

Ĉiuj detaloj pri la aranĝo (aliĝilo, prezoj, ĉeestont-listo) aperos en proksima tempo jam ĉe la paĝaro www.esperanto.sk

Planita estas komuna vojaĝo al la EEU-kongreso por tiuj, kiuj volos plu spertiĝi en la lingvo kaj/aŭ simple plu esperantumi somere.

Kaj ĉar ĉi-jare ni ankaŭ festas la 100-jariĝon de Esperanto en Slovakio, por la Somera Esperanta Studado (SES) – kiel sonas oficiala nomo de la aranĝo – ni elektis la plej taŭgan (almenaŭ laŭnome :)) lokon: hotelo Esperanto en Pribylina (www.hotel.esperanto.sk)

La aranĝo estos internacia – jam konfirmis sian partoprenon studentoj el 7 nacioj – tiel ni do povos atingi pli rapidan lernadon – motivigitan je emo komuniki tuj kun eksterlandanoj.

La programo estos dividita al 2 partoj:

- kurso por komencantoj (gvidos slovako Stano Marček – ĉefredaktoro de la Revuo Esperanto)
- kurso por progresintoj (gvidos rusino Mirina Gončarova, alterne kun pluaj eksterlandaj instruistoj)

Ĉiuj detaloj pri la aranĝo (aliĝilo, prezoj, ĉeestont-listo) aperas en nuna tempo jam ĉe la paĝaro www.esperanto.sk (La preciza ligilo estas www.esperanto.sk/ses)

Se vi do volas pasigi julie unu libertempan semajnon en bela naturo de Malaltaj Tatroj, en internacia amika etoso kaj eklerni aŭ plibonigi sian Esperanton – aliĝu al la lernejo – lokoj estas limigitaj.

Peter Baláž

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de marto 2007.

Redaktorino: Vesna Obradović.

Pri la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Seán Ó Riain, Margarita Zelve, Peter Baláž, Yves Nevelsteen, Brian D.Kaneen, Monique Prezioso kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu